

Enhavo: Atenco sen senco

## ★ Atenco sen senco ★

### Kiu volis mortigi Ferdinandon „La Bonvoleman“?



*Ferdinando la 5a (1793-1875)  
aŭstria imperiestro dum 1835–1848  
reĝo hungara, reĝo bohemia, margrafo moravia, ktp.*



*Medalo de la kronado en Prago (1836)*

Festoj de la kronado de la rusa caro Nikolao la 1a okazis en Sankt-Peterburgo en 1826.

Ĉiukaze, oficiala aŭstra delegacio alvenis en la rusan ĉefurbon por gratuli sian aliancanon. Sed ĝi vekis konsiderindan embarason. La delegacion estris la heredonto de la imperiestra trono, la ĉefduko Ferdinando.

La rusaj korteganinoj apenaŭ povis reteni sian ridon.

Sed ili almenaŭ strabis unu al la alia, kiel la stranga viro kun la misproporcie granda kapo kompare kun la resto de lia korpo balbutis gratulan parolon. "Do ĉi tiu estas la unuenaskita filo de la imperiestro Francisko?" La ĉeestantaj Romanov-familianoj tre miris.

---

*Gepatroj de Ferdinando, de la posta aŭstra imperiestro dum la jaroj 1835–1848, reĝo de Hungario, Bohemio, margrafo de Moravio, ktp.*



Imperiestro Francisko, kiu profunde amis sian unuenaskitan filon Ferdinando, malgraŭ lia mensa handikapo



Maria Tereza de Napolo-Sicilia romia kaj aŭstra imperiestrino reĝino de Bohemio, Hungario kaj Kroatio

Antaŭ 146 jaroj, la 29an de junio 1875, mortis ĉe la Praga Kastelo la lasta kronita bohemia reĝo Ferdinando la 5a, krome la aŭstra imperiestro kaj la hungara reĝo. Kvankam kuracistoj ne antaŭdiris lian vivon tre longa pro lia sanstato, li finfine vivis ĝis respektinda aĝo de 82 jaroj.

## Personeco

Ferdinando, aŭ iomete karesnome Nandl, havis malmultan ŝancon travivi tuj post sia naskiĝo en 1793. Dum li kreskis, estis klare, ke li certe ne estas sana. Li havis nenature grandan kapon kun kurba vizaĝo, senĉese duone malfermita buŝo, malgranda korpo, kaj kun mallongaj brakoj kaj kruroj, cetere trafitaj de rakito. Li parolis malbone kaj ŝanĝeliĝis, turmentata de nervaj tikoj kaj konvulsioj, ridetante kaj suferante epilepsiajn atakojn, post kiuj li ofte svenis. Ferdinando Karlo Leopoldo Josefo Francisko Marcelino, kiel sonis lia plena nomo, estis filo

de la aŭstra imperiestro kaj de la hungara kaj bohemia reĝo Francisko la 1a kaj Maria Tereza de Napolo-Sicilio. De la infanaĝo, li suferis de epilepsiaj atakoj kaŭzitaj de naskiĝo-traŭmato kaj rakito. La kialo de ĉiaj malfacilaĵoj povus esti interalie, ke la gepatroj de Ferdinando - la lasta imperiestro de la Sankta Romia Imperio de la germana nacio kaj la unua aŭstra imperiestro Francisko la 2a (1a) kaj Maria Tereza de Napolo-Sicilio - estis kuzoj de la unua

dum la geavoj de

Ferdinando estis eĉ siaj propraj

gefratoj. Ĉi tio signifas, ke Ferdinando havis nur kvar praavojn kaj ne ok kiel kutime. Nu, kaj tiam ni miru!



Ferdinando la 5a „La Bonvolema“ gra-  
aŭstra imperiestro, bohemia kaj  
hungara reĝo (1793-1875)

Li ricevis preskaŭ neniun edukadon ĝis en sia naŭa vivojaro, ĉar la tiutempaj kuracistoj kredis, ke fizika kaj mensa penado kondukas al plimalboniĝo de la stato ĉe epilepsiaj pacientoj. Ĉar la postaj progresoj de Ferdinando okazis malrapide, estis certaj timoj pri la postsekvado. Ferdinando havis muzikan talenton, ludis pianon kaj trumpeton, entuziasmiĝis pri botaniko kaj interesiĝis pri la evoluo de teknika disvolvado. Certe ne eblas nomi lin senmensa, ĉar li parolis kvin lingvojn. Aliflanke, li estis iom flegma kaj liaj sanproblemoj havis iujn aliajn limojn – al li komence estis malpermesita ajna mensa aŭ fizika agado por ne difekti lian sanstaton. La vartistino konstante prizorgis lin. Ili portis lin supren kaj malsupren laŭ la ŝtuparo, li praktike ne rajtis fari ion sola.

### Duobla portreto de la reĝa paro



Marie Anna Karolína Pia Savojská  
Imperiestrino de Hungario, Kroatio kaj Bohemio (1803-1884)

## Politika kariero

Ferdinando, poste ankaŭ nomata la „Bonvolema“ (pro sia bonvola naturo), naskiĝis la 19an de aprilo 1793 en Vieno de la

Habsburga-Lorena dinastio. En 1830 li estis kronita Reĝo de Hungario en Bratislavo (kies tiama nomo estis: germane Pressburg, hungare Pozsony, latine Posonium), kiel Ferdinando la 5a. Daŭre li tenis la titolon "Pli Juna Reĝo de Hungario kaj Arkiduko de Aŭstrio". Dum la kronada ceremonio, li parolis hungare kaj tiel fariĝis la dua kaj lasta reĝo (post la imperiestrino Maria Tereza), kiu parolis en la gepatra lingvo de siaj regatoj. En 1835, post la morto de la patro, Francisko la 1a, li fariĝis Imperiestro de Aŭstrio, kaj la 7an de septembro 1836 estis kronita Reĝo de Bohemio. La kronado okazis en la katedralo de St. Vito en Prago. Ferdinando estis unu el la plej popularaj monarkoj, sed li mem fakte ne regis. Lia patro antaŭ sia morto efektive transdonis la registaron al la ĉiopova kanceliero Metternich /metrniĥ/ kaj la Ŝtata Konsilio, kiun prezidis la onklo de la imperiestro – la arkiduko Ludoviko kaj kies membroj estis kaj Metternich kaj la bohemia grafo Francisko Antonio Kolovrat. Ĉi-lastaj du viroj prenis malsamajn politikajn poziciojn kaj blokis iujn ajn politikajn decidojn unu de la alia. Tio fine kaŭzis la revolucion de 1848. La 2an de decembro 1848 Ferdinando estis forigita de la trono kontraŭ sia volo kaj abdikis en la ĉefepiskopa palaco en Olomouc favore al sia nevo Francisko Josefo la 1a (1830-1916).

## Post abdiko

Ferdinando pasigis la reston de sia vivo kun sia edzino Maria Anna en Prago. Ili kune ne havis infanojn. Kvankam kuracistoj iam antaŭdiris mallongan vivon por li, li restis ĉi tie ankoraŭ 27 jarojn. Oni liberigis por li unu sekcion de la Praga Kastelo. La kastelo Zákupy (en norda Bohemio) apartenis al li ĝis la morto. Li veturadis tien de la kastelo Ploskovice en kaleŝo; de Prago ĉu per kaleŝo, aŭ ankaŭ per trajno. Lia edzino, princino Maria Anna Karolína de Sardio, foje veturis kun li. Tamen ŝi pasigis multe pli da tempo en suna Italio. Praganoj ŝatis lin; ili ofte vi-

dis lin promenadi laŭ la stratoj. Dum ĉiutagaj promenoj, li disdonis al infanoj bombonojn kaj al malriĉuloj pro kompatan almozon. Li iom post iom donacis por Prago entute 450.000 guldenojn. Li mortis en la aĝo de 82 jaroj en la Praga Kastelo la 29an de julio 1875.

## **Li dividis sian manĝaĵon kun ĉiuj**

"Bonulo Ferdo", "Malsaĝula Ferdo" aŭ "Pajaco" - tiel la vi-  
enanoj parolis pri la kronprinco. Sed ili ne intencis ĝin malice.  
Kvankam Ferdinando unuavide havis handikapon, li gajnis la  
korojn de siaj estontaj regatoj. Li estis infanece simpla, ho-  
nesta, nekapabla intrigi. Li ne havis malamikojn. Li mem re-  
spektis homojn, li povis aprezi ilin, li kompatis ilin. Ferdinando  
servis ĉiujn petantojn. Jam en la aĝo de 12 jaroj, kiam la patro  
translokis lin de Vieno al Košice /košice/ (nun Slovakio) pro la  
napoleona minaco, li organizis kolektojn por malriĉuloj aŭ live-  
ris manĝaĵojn de sia propra kuirejo al la loka milita hospitalo.  
Dum liaj promenadoj, la helpantoj devis limigi lin, por ke li ne  
donu tro da almozoj. Tamen la malavareco de Ferdinando post  
la murdo ŝokis la tutan monarkion ... Kio tiam okazis?

## **La urbon Baden (proksime de Vieno) trafis evento, kiun tute neniu povis kompreni!**

Baden estas paca banurbo, fama pro siaj sulfuraj banejoj,  
ĉirkaŭ 30 kilometrojn sude de Vieno. Antaŭ jaroj, imperiestro  
Francisko aĉetis someran loĝejon ĉi tie. Ferdinando ofte restis  
tie, ĉar la tiamaj kuracistoj kredis, ke la banoj helpas lin de epi-  
lepsiaj atakoj. En aŭgusto 1832 ĝi ne diferencis. Ferdinando,  
kiu tiam estis la kronita "Pli Juna Hungara Reĝo", ĝuste tiam  
ĝuis sian restadon ĉi tie. Akompanate de sia helpanto kaj sam-  
tempe ia korpogardisto, li faris unu el la regulaj promenadoj  
ĉirkaŭ la urbo. Dum tiu promonado li estis atakita. Kiel ĝi

okazis? Ambaŭ viroj trankvile iris laŭ la strato. Ili eble eĉ ne rimarkis la nigran viron ŝteliri nerimarkite malantaŭ ili. Subite la nekonata viro plirapidigis siajn paŝojn kaj la promenantan paron li reatingis. Li lanĉis pafon de pistolo. Ferdinando tuj tuŝis sian ŝultron. Lia helpanto anstataŭ, ke li staru sentime kontraŭ la atakanto, forkuris. La arkiduko ŝokiĝis. Li rigardis terurite, kiel la fremdulo denove eltiris sian armilon al la sekva pafo. Bonŝance, li maltrafis Ferdinandon. La tria kuglo tute ne eliris el la pistolo. "Kaptu lin!", Ferdinando kriis sence. Ĝardenisto el proksima domo jam rapide alproksimiĝis al la loko de la okazintaĵo. Post kurta bataleto la murdisto estis pacigita. Skuita, Ferdinando ekrigardis sian manon. Li ne estis vundita. La sola kuglo, kiu trafis lin, estis blokita en la ŝultrokuseno de lia jako. Li estis tre bonŝanca. La posteulo eskapis de la atenco sen vundo. Ankaŭ danke al tio, li poste povis sidi eĉ sur la bohemia imperia trono.

## **Ĉu reĝa almozo estis por iama armea kapitano tre malmulta?**

„Kiu povus fari tian aferon?!” La vienanoj nekrede balancis la kapon, dum novaĵoj pri la atenco disvastiĝis tra la urbo. Neniu povis kompreni ĝin – ĉiuj sciis, ke Ferdinando povus vundi eĉ ne muŝon ... Dum la posta esploro, montriĝis, ke la pafanto estis eksa armea kapitano, Franz Reindl. Li devis adiaŭi la armeon pro sia inklino al troa alkoholkonsumo. De la ĉefduko en Badeno li petis monon - entute 900 guldenojn. Ferdinando tamen donis al li nur 100 guldenojn, ne havante pli en sia poŝo. Kvankam ĝi ankaŭ estis reĝa almozo, la viro tiom koleris, ke li decidis ataki la kronprincon. La puno por lia ago estis la sola ebla - morto! Tamen la ĉefduko tiam vizitis sian imperiestran patron - Franciskon la 2an, kaj pledis por mildeco. La mortpuno pro la malsukcesa atenco finfine ne plenumiĝis. Reindl poste mortis en malliberejo.





*Duopa portreto okaze de la kronado de la reĝa paro en Prago.*



*Argenta medalo (1836), aŭtoroj: G. B. Loos, A. L. Held, diametro: 39 mm, maso: 19,1 g (pligrandigita)*



*Kronado de Ferdinando la 5a fare de la bohemia reĝo en la katedralo St. Vito, Václav kaj Vojtěch en Prago. La aŭtoro de la pentraĵo estas la pentristo Leopold Bucher (1797-1857)*

**JoPeK**